

Metodo 11

Nouvelle édition

Kiel plej efike uzi ĝin ?

Gvidilo por uzi utile la rapidkurson

Tiu-ĉi metodo ellaborita por la neprofesiaj instruantoj ankaŭ plaĉos al la aliaj pro ĝia moderna efikeco.

Metodo 11 celas, ke vi ne “perdu” viajn lernantojn en la unuaj lecionoj. Vi povas ne uzi la francan lingvon. Bone legu la konsilojn prezentitajn komence de tiu libreto.

Metodo 11 limigis sian vorto-trezoron je proksimume 500 radikoj, ĉar seriozaj statistikoj montris, ke – en la tuta mondo – neniu uzas pli multajn en ordinaraj konversacioj. La selekto estis do farita laŭ la ofteco ĝenerala.

Metodo 11 rezultas el la laboro de pluraj profesoroj pri fremdaj lingvoj. Ĝin kontrolis membro de FRANCA ESPERANTO-INSTITUTO.

Al instruistoj pri lingvoj

Ankoraŭ tro malmultas la instruistoj pri lingvoj, kiuj krome instruas la internacian lingvon. Pli multnombraj estas la neprofesiaj instruistoj, kiuj sukcesis pluviigi la movadon per sia senlima sindonemo. Ĉefe ilin celas **Metodo 11** kaj tiu gvidilo, kiuj ebligas memlerni la teknikojn de moderna lingvoinstruado.

Montriĝis, ke tia materialo estas bezonata, ĉar jam aperis pluraj plibonigitaj eldonoj de **Metodo 11**. Skeĉoj nun ebligas uzon de la lingvo en "situacioj", kio certe igos la kursojn pli dinamikaj kaj gajaj. Aliajn plibonigojn ni ŝuldas al utilaj konsiloj de uzintoj, al kiuj ni ege dankas.

Instruistoj pri lingvoj tiujn teknikojn bone konas; ili do uzos nian materialon senprobleme; tre verŝajne ili eĉ ŝatos intrui per libro, en kiu ĉiuj kursoj jam estas preparitaj! Ĉu ili ankaŭ helpas al ni per disvastigado de tiuj konsiloj ĉe neprofesiaj instruantoj? Kun antaŭdanko ni akceptas ĉies proponojn por estonta kunlaborado. Ni kune starigu la bezonatan reton de efikaj esperanto-instruantoj!

Espéranto-France

Al instruantoj kaj instruistoj

Lingvon oni lernas por ĝin paroli... Oni ĝin do lernu parolante. La jena kurslibro tute baziĝas sur tiuj principoj. Sur la postaj paĝoj vi trovos sufiĉe detalajn konsilojn por ekspluati ĝisfunde la proponitan materialon, sed antaŭ ol ilin legi – kaj praktigi kion oni proponas – necesas konsciĝi pri la jenaj gravaj punktoj:

- Tiu kurslibro celas simplan lingvo-praktikadon post "dek-perioda" kurso, ekzemple okaze de dek-taga staĝo, dum kiu la gelernantoj havu la tempon lerni kaj fari taskojn post la matenaj ĉirkaŭ duhoraj kursoj.
Vi ja konstatis, ke la vortprovizo estas sufiĉe malvasta, do rapide lernebla de la gelernantoj. Ĝi kompreneble ne ebligas diri ĉion ajn; la gelernantoj ĉefe lernu la uzadon de la plej necesaj strukturoj por paroli simple.
Kiam ili scipovos: paroli flue pere de la proponita vorttrezoro, nenio malhelpos, ke ili lernu pliajn necesajn vortojn; la atingo de tia flua konversacio estas ebla post la aplikado de la proponataj instru-tekniko. Por ke ĉiuj havu la okazon paroli, la maksimuma nombro da gelernantoj ne superu dek-kvin.
- La fonetika sistemo de Esperanto, ĝia reguleco ebligas, ke oni plenprofite tuj pritraktu la prononc-manieron. La lingvo ofertas tiun eblecon, ni do ne perdu nian tempon. Tial la lernado de vortlistoj en elementa kurso estas ebla kaj ebligas pli rapidan progreson, kondiĉe ke la vortoj estu tre uzataj anstrukturoj, en frazoj.
- Dum la tuta kurso kaj ekde la unua leciono, la instruanto kaj la gelernantoj tuj kaj nur parolu en Esperanto! Eĉ naci-lingvaj klarigoj pri gramatiko povas ne ekzisti, ĉar la elektitaj ekzemploj sufiĉe klare evidentigas la strukturojn. Ankaŭ ne gravas, se la gelernantoj ne tuj komprenas ĉion, iom post iom ili alkutimiĝos. Ĉefe gravas, ke ili moviĝu en tiu lingva bano kaj pensu rekte en Esperanto.

Ĉiu leciono konsistu el kvar partoj:

1. Unue, dum ĉirkaŭ kvaron-horo, oni ripetu la akiraĵojn de la antaŭa leciono.
2. Oni uzigu la novajn vortojn kaj la novajn strukturojn.
3. Venas nun la laboro pere de la teksto mem:
 - a. memorigado de la teksto.
 - b. "ludado" de la skeĉo.
 - c. post-rakontado.

NEPRA POSTULO : oni ne traduku!

4. Oni faru parole la ekzercojn, kiuj estas farotaj skribe por la venonta leciono:
 - a. demandoj pri la teksto. Tiuj demandoj estas aŭ sufiĉe precizaj – por kontroli ĉu la gelernantoj komprenis kaj la demandon kaj la tekston – aŭ pli "malfermitaj", kio ebligas pli liberan sin-esprimadon de la lernantaro.
 - b. Tio ĉiam estu nia celo.
 - c. Kompletigotaj frazoj por kontroli la ĝustan uzadon de finaĵoj aŭ afiksoj.
Tiuj simplaj ekzercoj ofte trankviligas la malplej lertajn.
 - d. Finfine restas kelkaj al- kaj de-tradukoj por kontroli aŭ la ĝustan aplikadon de strukturoj aŭ la komprenon de vortkumetaĵoj.
 - e. Por la dua aŭ tria parto de la "leciono", dek-minuta paŭzo verŝajne estos bonvena.

Kiam vi estos finleginta ĉi-tiun antaŭparolon kaj la konsilojn en la postaj paĝoj, vi eble diros: tio ne eblas, mi ne povas postuli tiom de miaj gelernantoj! ... male: postulu!

Tre rapide vi vidos la rezultojn. Sed sciu, ke multo dependas de vi... do ankaŭ estu postulema kun vi mem. Transdonu al la lernantaro vian entuziasmon, ĉiam instigu ĉiun paroli kaj demandi, ne nur per mallongaj frazeroj, sed tuj ĉe la komenco per kompletaj frazoj.

Tamen nulaj estos la rezultoj, se vi ne atentis pri nia lasta konsilo: ... Gelernantoj havu la rajton erari!

Vi do ne haltigu ilin post ĉiu eraro! Vi povas korekti aŭ korektigi fare de alia lernanto iom poste. Kaj ne forgesu: ne ĉiuj gelernantoj volas esti Esperanto-instruistoj... Ili volas uzi la lingvon kiel komunikilon. Cetere... ĉu la instruantoj neniam eraras ?

Fine de la 10-a leciono, por ke la lernantoj tuj sin trejnu al pli riĉaj konversacioj, ni aldonis la liston de la aliaj plej uzataj vortoj. Laŭ la modelo de la kunmetita letero, instigu al sama kreado de leteroj, de tekstoj, de skribitaj konversacioj, de raportoj laŭ la gusto individua.

Tiasisteme la novaj parolantoj al kutimiĝos al serĉo de mankantaj aŭ nekonataj vortoj. Ili, poste, pli nature kuraĝos legi gazetojn, revuojn, librojn kaj pretos alfronti pli superajn kursojn aŭ staĝojn.

Samtempe konsilu al viaj gelernantoj, aliĝi al pli kompleta Esperanto-kurso (kie ili tre rapide progresos) kaj al nia movado. Vi mem diskutu kun aliaj Esperanto-instruantoj, petu konsilojn ĉe lingvo-instruistoj kaj ĉefe partoprenu staĝojn, kie oni povas lerni kaj praktiki novajn teknikojn.

Espéranto-France

Enkonduka leciono

- A Prezentu Esperanton kaj ĝiajn uz-eblecojn.
- B Vidigu la alfabeton (uzu la kurslibron).
Klarigu la pronco-manieron
- C Lasu la gelernantojn ripetadi dum dek minutoj, kion ili ĵus lernis.
 - Vi legu ĉiun vorton... ili ripetu.
 - Ili nun legu la presitajn ekzemplojn kaj la teksteton.
(Atentu pri bona prononco kaj ĝusta akcento)

- D Diktu la vortojn kaj la etan tekston.
 - Ili poste komparu kun la teksto en la libro.

Ne gravas, se ili ne komprenas la signifon de ĉiuj vortoj... Ili rekonu sonojn.

- D Legigu la vort-liston de la unua (1a) leciono.

Tasko por la venonta kurso :

1. Lerni la prononcon.
2. Scipovi la ekzemplojn kaj la etan tekston.
3. Lerni la vort-liston kaj la gramatikon de la unua (1a) leciono.

Unua leciono

Gramatikaĵoj

Demandvortoj : ĉu, kio, kiu

Gramatikaj finaĵoj : -o, -j

Artikolo: la

Personaj pronomoj : mi, vi, li, ŝi, ĝi, ni, vi, ili

Verboj : esti, demandi, diri

Adverboj : jes, ne

Prepozicioj : en, sur

Konjunkcio : kaj

Sufiksoj : -in-, -ist-

Sub-propozicioj : Mi demandas, ĉu... , kio... , kiu...

Mi diras, ke ...

Teksto : La familio de Marko

1. Ripetado de la leciono

- Legigu la lernitan vortprovizon (Atentu pri la prononco)
- La gelernantoj kaŝu la tekston

Dum la instruanto aŭskultigas dufoje la tekston, ili aŭskultu, rigardante la bildojn, poste ili fermu la libron. (Tio estas unua kontakto kun la teksto. Al ĝi oni revenos post la ekzercoj).

2. Ekzercoj – Vortprovizo kaj strukturoj

Antaŭ, aŭ prefere post ĉiu nova ekzerco, la instruanto povas skribi tipan ekzemplon sur la tabulo.

Mi estas sinjor(in)o X

Kiu estas vi / li / ŝi / mi ?

Demandu plurajn.

Tiel ili reuzas la personajn pronomojn kaj alkiutimiĝos al la signifo de "kiu"

Mi estas instruisto

Ĉu vi / li / ŝi / ni / vi / ili estas ... instruist(in)o ? / sportisto(j) ? /
patr(in)o(j) ? / lernanto(j)? / laboristo(j) ?

(aldoniĝis al la uzo de la personaj pronomoj novaaj vortoj, uzo de la sufikso -in- kaj de la pluralo).

La gelernantoj konjugaciu: Mi estas Sinjor(in)o ...

Vi estas ... ktp.

Demandoj: Mi estas instruisto. Kio estas Marko?

Kio li ankaŭ estas? (2 respondoj)

Kio estas la patro?

Kio estas la patrino?

Kio estas tio? (montru seĝo-j-n, tablo-j-n, libro-j-n, ĉambbron, kreton...)

Ĉu vi (li, ŝi, ktp.) sidas?

Kiu sidas sur la seĝo? staras?

Ĉu ankaŭ vi, li, ŝi, ili... instruas?

Ĉu mi, vi, ktp. lernas?

... estas simpatia(j)?

Kiu(j) estas en la klasoĉambro? en la domo?

(post tiuj ekzercoj la signifo de "kiu" kaj "kio" devas esti evidenta, sen klarigo per traduko)

Ekzercoj A kaj B (kurslibro)

(ili ne rigardu la tekston de la ekzerco)

1. La instruisto legu la modelon.
2. La instruisto: "Ĉu Marko estas knabo?"
3. Pluraj gelernantoj, unuope: "La instruisto demandas, ĉu..."
4. La instruisto ripetu; (saman respondon) "Marko estas knabo."
5. Ĉiuj kune: "La instruisto demandas, ĉu Marko estas knabo."

(vi donu mansignon, por ke ili ekparolu kune)

Atentu: tiajn ekzercojn oni faru sufiĉe rapide, unu- aŭ dufoje

Konsilo al la gelernantoj: ili refaru tiujn ekzercojn hejme – plej bone helpe de la registradoj –, ĝis ili kapablas ilin fari senhezite.

3. Prilaborado de la teksto

- La gelernantoj kaŝu la tekston, rigardu la bildojn... kaj aŭskultu... dum la instruisto legas dufoje la tekston.
- Sen rigardi la tekston kaj helpe de la bildoj, la gelernantoj retrovu la frazojn de la teksto.
Unua provo: ĉiu aldonu detalojn
Dua provo: unu aŭ du el ili rakontu la tekston kiel eble plej precize.
- Legidu la tekston.

4. Ekzercoj

- La instruisto faru la demandojn de la ekzercoj kaj la gelernantoj respondu kiel eble plej detale. (oni lasu ilin sin esprimi)
- Ili legu la tekston.
- Faru parole la skriban ekzercojn.

5. Tasko por la venonta kurso

1. Lerni (eĉ parkere) la tekston helpe de la bildoj.
2. Refari (plurfoje) la parolajn ekzercojn.
3. Fari la skribajn ekzercojn.
4. Lerni la gramatikaĵojn kaj vortprovizon de la venonta leciono.

Gramatikaĵoj

Demandvortoj : **kia**

Akuzativo: **-n**

Tempoj: **-os** (morgaŭ)

Posedaj pronomoj kaj adjektivoj:
mia, via, lia, ŝia, ĝia, nia, via, ilia

Adjektiva finaĵo: **-a**

Prepozicio: **al**

Konjunkcio: **sed**

Prefiksoj: **mal-, ge-**

Teksto : La nova ĉemizo

1. Ripetado de la leciono

- Ĉiu rakontu la unuan (1an) tekston al sia apudulo.
La instruisto iru de unu duopo al alia kaj aŭskultu.
- Refarigu la parolajn ekzercojn de la kurslibro. (*se vi havas tempon refarigu parole kaj rapide la skribajn ekzercojn*)
- Kolektu la taskojn hejmajn.

Poste: la gelernantojn kaŝu la tekston de la 2a leciono, dum la instruisto aŭskultigas dufoje la tekston, ili aŭskultu, rigardante la bildojn. Ili fermu poste la libron. La ekzercoj estu farotaj sen teksto.

2. Ekzercoj – Vortprovizo kaj strukturoj

Ĉu mi estas via...

lia / ŝia... instruist(in)o? (al pluraj)

Ĉu via klasĉambro estas granda, bela, nova, blanka, pura?

Kia estas la klasĉambro? Ĉu ĝi estas granda, bela, nova, pura?

(respondigu per mal-vortoj: "Ne, ĝi estas malgranda...")

Rimarko: Ĉiam la gelernantoj bezonos la refleksivon "sia". Endkonduku ĝin per la sekvanta ekzerco:

Instruisto: "Amiko..."

Lernanto (*alparolanta sian apudulon*): "Li parolas pri sia amiko".

Instruisto: "Amikino... patro... patrino... filo... filino... lernantoj..."

Lernanto: "Li parolas pri..." (*priatentu la bonan respondon: ... siaj lernantoj*)

Pliaj ekzercoj en la 4a kaj 7a lecionoj.

Instruisto:	Vi ne laboras! ...	Lernanto:	Sed morgaŭ mi laboros!
	Vi ne lernas!		Sed ...
	Vi ne komprenas!		Sed ...

Vi ne skribas!

Vi ne legas!

Vi ne rapidas!

Vi ne iras al la lernejo!

Vi ne iras al la fabriko!

Instruisto: **Mi havas belan libron. Ĉu ankaŭ vi havas belan libron?**

(*al pluraj*) **Ĉu vi legas ĝin?**

Ĉu vi vidas ŝin? lin? ilin? min? ... (montru ilin ...)

Ĉu vi havas belan domon? ... belan libron? ...

grandan tablon? ... bonan laboron? ...

Dua leciono

Parolaj ekzercoj A - B - C

Poste la gelernantoj prenu la libron, kaj diru kion ili vidas sur la bildoj de la unua (1a) kaj dua (2a) lecionoj, laŭ la modelo: **Mi vidas + adjektivo + substantivo -N**

Sufikso ge-

Patro kaj patrino estas gepatroj.

Kio estas frato kaj fratino? sportisto kaj sportistino?

amiko kaj amikino? laboristo kaj laboristino? knabo kaj knabino?

Kiajn librojn vi ŝatas?

Kiajn ĉemizojn vi ŝatas?

Kiun mi amas?

Kion ni faros morgaŭ?

La gelernantoj ankaŭ refaru frazojn laŭ la modelo:

Mi demandas, ĉu ..., kio ..., kiu ...

Mi respondas, ke ...

Mi diras, ke ...

3. Skeĉo

1. Ili kaŝu la tekston de la skeĉo kaj rigardu la bildojn.
2. Vi aŭskultigu la skeĉon dufoje.
3. Ripetigu ĉiujn eldirojn.
4. Reaŭskultigu la skeĉon
5. Rigardante la bildojn la gelernantoj provu rediri la skeĉon (ĉiuj povas helpi).
6. Ili ludu la skeĉon duope.

4. Ekzercoj de la 2a leciono

5. Tasko por la venonta kurso

(laŭ la modelo de la leciono)

ATENTU : nova speco de ekzerco

Ekde nun vi povas transformigi ĉiujn skeĉojn en tekstojn sendialogajn. Tiel la gelernantoj – kiuj espereble scipovas la skeĉon parkere – estas devigataj uzi novajn, pli kompleksajn strukturojn.

Provo per la skeĉo n. 2, kiun la gelernantoj bone konas.

Modelo:

Marko telefonas al sia amikino Ana.

Li salutas ŝin, kaj ŝi demandas, kio estas nova.

Hodiaŭ li ne vidas ŝin: post la kursoj ŝi iros al la urbo por aĉeti ĉemizon.

Marko demandas, kian ĉemizon ŝi aĉetos.

Estos bela, nova, blanka ĉemizo.

Sed Marko ne komprenas... ŝi jam havas tri ĉemizojn: verdan, ruĝan kaj bluan.

Ĉu ili ne plu plaĉas al ŝi?

Kaj ĉu ŝi havas monon?

Ŝiaj gepatroj donos al ŝi monon kaj ŝi iros kun sia juna fratino kaj ŝia amikino... Kaj Marko?

"Ĝis morgaŭ!" ŝi diras.

Tiu ekzerco estas farebla parole, tuj post la ludado de la skeĉo.

Gramatikaĵoj

Demandvortoj : kie? kiom (da)? kiam? kiel?

Adverba finaĵo : -e

Numeraloj :

nul, unu, du, tri... dek, cent, mil, miliono

Prepozicioj : sub, antaŭ

Sufiksoj : -ul-, -ej-

Tempo : -is (hieraŭ)

Relativaj pronomoj : la knabo, kiu kuras ...

la knabino, kiun ni vidas ...

Noto: en la lernolibro estas mistajpo en la listo de la numeraloj. En la libro, estas skribite "nulo" anstataŭ "nul". Povas estis la okazo atentigi viajn lernantojn pri la diferenco inter "nul" kaj "nulo".

Teksto : Al la lernejo

1. Ripetado de la dua (2a) leciono

- Ludigu la skeĉon
- Kolektu la hejmajn taskojn
- Dufoja aŭskultado de la 3a teksto

2. Ekzercoj - Vorprovizo kaj strukturoj

- Nombrigi de 1 ĝis 10, poste 20, 30, 40... 100
- Legigi nombrojn, kiujn vi skribas sur la tabulo.

Kiom estas ... + (plus) ... ?

... - (minus) ... ?

Nun sen skribi sur la tabulo.

Kiom da tabloj, seĝoj; libroj, gelernantoj, mebloj, tabuloj... estas en la ĉambro?

Instruisto

Lernant(in)o

Nun mi legas libron.

Hieraŭ ankaŭ mi legis libron.

Nun mi trinkas teon.

Hieraŭ ankaŭ mi trinkis...

Nun mi instruas.

Nun mi kalkulas.

Nun mi laboras.

Nun mi trinkas sukon.

Nun mi feliĉas.

Kiel vi (li, ŝi) lernas? ... Bone aŭ malbone?

Rapide aŭ malrapide?

Facile aŭ mal facile?

(demandu al pluraj)

Poste ili faru frazojn laŭ la modelo:

La instruisto demandis, kiel ŝi / li lernas ...

... kaj ŝi/li respondis, ke ŝi/li lernas bone.

Sufikso -ejo

Dormejo estas loko, kie oni dormas.

Kio estas manĝejo? laborejo? kafejo? haltejo? lernejo?

Parolaj ekzercoj A - B - C de la kurslibro

Poste, rigardante la bildojn de la unua aŭ de la dua leciono, ili faru frazojn laŭ la jena modelo:

La knabo, kiu ...

La knabino, kiun mi vidas

Prepozicioj: sub, antaŭ, malantaŭ, en, sur

Prenu objekton (ekz. kreton) kaj metu ĝin sub, antaŭ, ktp. alian objekton.

Demandu: Kie estas la kreto?

Se restas tempo, ne forgesu ekzercojn pri la akuzativo. (vidu la antaŭajn modelojn)

3. Skeĉo

laŭ la modelo de la dua (2a) leciono

4. Ekzercoj de la 3a leciono

5. Tasko por la venonta kurso

vidu la antaŭan

Kvara leciono

Poste unu ordonu al alia laŭ la sama ekzerco.

Oni rimarkigu, ke ĉiuj "personoj" povas esti konjugaciaj en la imperativo... sed forigo de la persona pronomo eblas nur ĉe la "dua" persono: vi.

Parola ekzerco B

(samtempe uzo de "ĝi" + akuzativo)

Alia ekzerco :

Instruisto : Tio estas miaj haroj, miaj manoj ... Kion mi montras ?

Lernanto : Vi montras viajn harojn, viajn manojn.

same : Tio estas mia buŝo, kapo, nazo, piedo, ŝuo, okulo, libro.... Kion mi montras?

Mi montras mian nazon, buŝon, ktp.

De kaj el : De kie vi venas ? Mi venas de / el ... (ĉiu nomu sian urbon)

3. Skeĉo

laŭ la modelo de la unua leciono

4. Ekzercoj de la 4a leciono

Rekontrolo : la refleksivo "sia"

Legigu la unuan paragrafon de la teksto en la tria persono: Ana rakontas, ke ŝi iras en sian ĉambron...

5. Tasko por la venonta kurso

laŭ la modelo de la unua leciono

Kvina leciono

Gramatikaĵoj

Korelativa sistemo: kiom, kial (vidigu la sistemon)

Prepozicioj: dum, per

Komparativo : tiel... kiel, pli... ol, malpli... ol

Konjunkcio: ĉar

Superlativo : (la) plaj... el

Sufikso: -il

Teksto : Nova aŭto

1. Ripetado de la 4a leciono

- Rakontigu la tekston.
- Kolektu la hejmajn taskojn.
- Dufoja aŭskultado de la 5a teksto.

2. Ekzercoj - Vortprovizo kaj strukturoj

Oni skribas per skribilo.

Per kio oni aŭskultas ? veturas ? montras ?

Oni flaras per la nazo.

Per kio oni vidas ? parolas ? marŝas ? flaras ? laboras ?

Mi laboras, ĉar mi volas havi monon. Kial vi laboras ?

lernas ? iras al la kafejo ? kisas vian amik(in)on ?

(... ĉar ...)

Instruisto : Ĉu unu tago sufiĉas por vojaĝi piede ĉirkaŭ la teron ?

Lernanto : Ne, ni devas vojaĝi dum pli ol unu tago.

Parolaj ekzercoj A - B - C

(Sribu ĉiam ekzemplon sur la tabulon)

Post la ekzercoj, la gelernantoj mem trovu ekzemplojn. Ili uzu la objekton aŭ personojn de la klasĉambro aŭ la bildojn de antaŭaj lecionoj aŭ la instruisto montru alportitajn objektojn aŭ bildojn.

Kiel vi fartas post tiu leciono ? ... Bone aŭ malbone ?

Kiel kuras hundo ?

Kiel kantas la instruisto ?

Kiel kisas via amik(in)o ?

Kiam vi lern-is vian lecionon ? ... (hieraŭ)

Kiam vi far-os vian taskon ? ... (morgaŭ)

Kiam vi iros hejmen ? ... (helpu eventuale la respondant-in-on)

Kial Ana kaj Marko malfruis ?

Kial Sinjoro Rapid volas novan aŭton ?

Kial Ana volas novan ĉemizon ?

Kial vi lernas Esperanton ?

Kvina leciono

Skribu sur la tabulon jenajn vortojn kaj petu tutsimple pri la traduko:

kiu	iu	tiu	ĉiu	neniu
kio	io	
kia		
kie	...			
kiam				
kiom				
kial				
kiel				

Kompletigu la tabulon helpe de la gelernantoj.

- Ili nur rigardu kaj ne skribu.
- Hejme ili ĉefe lernu la substrekitajn vortojn.
- Kelkajn ili jam konas de la unuaj lecionoj.

Ekzerco

(Forviŝuta tradukon)

- Petu, ke ili mem faru frazojn pere de la diversaj vortoj de la tabulo.
- Tiele vi tuj vidos, ĉu ili bone komprenis ties signifon.
- Se restas tempo refaru ekzercojn de la antaŭaj lecionoj.

3. Skeĉo

laŭ la modelo de la 2a leciono + transformigu

4. Ekzercoj de la 5a leciono

5. Tasko por la venonta kurso

laŭ la modelo de la unua leciono + lerni la substrekitajn vortojn de la korelativa sistemo

Gramatikaĵoj

Postulaj frazoj : mi volas, deziras, postulas, petas, ke ...-u !

Prepozicioj: por, pri, je

Sufiksoj: -et-, -eg-

Prefikso: re-

Kun-meto de vortoj

Teksto : Maja

1. Ripetado de la 5a leciono

- Rakontigu la skeĉon.
- Ludigu la skeĉon kaj transformigu ĝin
- Kolektu la hejmajn taskojn.
- Dufoja aŭskultado de la 6a teksto.

2. Ekzercoj - Vortprovizo kaj strukturoj

Kio estas skribo-tablo ? lingvo-libro ? te-taso dormo-ĉambro ? instrulibro ?
helplingvo ? mezbona lernanto ?

(ili ne traduku)

Malgranda hundo estas hund-et-o.

Kio estas hund-et-o ?

Kio estas malgranda kato ? birdo ?

domo ? ĉambro ? lito ?

Iu nur iom dormas: li dormetas.

Kion faras birdo, kiu malmulte flugas ?

Kion faras knabino, kiu ne multe manĝas ?

Kion faras knabineto, kiu malrapide kuras ?

Dom-eg-o estas tre granda domo.

Kio estas grandegulo ? pordego ? buŝego ? nazego ?

Kiun Marko am-eg-as ? Kial li ofte kur-eg-as ?

Parola ekzerco A

(Marko kaj lia patrino parolas)

Poste la lernantoj konu aliajn ordonojn al vi aŭ al aliaj gelernantoj:

Mi petas, ke vi ... -u !

Vi (aŭ ili) respondu:

Kial vi deziras, ke mi ... -u ?

Dimanĉe mi ne laboris. Ĉu vi laboris dimanĉe ?

Kion vi faris lunde ? marde ? merkrede ?

Ĉu vi ĉiam laboras semajne ?

Ĉu vi mallaboras ĉiudimanĉe ? Ĉu vi laboras ĉiutage ?

Ĉu vi laboris lundon ?

Sesa leciono

Instruisto : Ĉu li faris belan foton ? Lernanto : Ne ! Li refaru ĝin !

Instruisto : Ĉu li bone lernis la lecionon ? Lernanto : Ne ! Li ...
Ĉu li bone faris la taskon ?
Ĉu li bone legis ?
Ĉu li bele skribis ?

Parola ekzerco B

Tio okazis lunde. Sed kiam? Je la oka aŭ je la naŭa ?
*Per malnova murhorloĝo aŭ per kartona ciferplato,
aŭ per desegnoj sur la tabulo, respondigu ilin al la demando...
... Kioma horo estas ?*

Parola ekzerco C

Post la ekzerco:

Pri kio ni hodiaŭ parolis? parolos ?
Pri kiu (kio) vi pensas (*demandu plurajn*)

Se restas tempo kaj laŭ la ofteco de la diversaj eraroj, refaru ekzercojn laŭ la modeloj donitaj en la antaŭaj lecionoj.

Nepre necesaj ekzercoj estas tiaj pri:

- la akuzativo (objekto)
- la akuzativo de "direkto"
- la demanda subpropozicio enkondukata de "ĉu".

Ekz.: Mi demandas, ĉu ...

Mi ne scias, ĉu ...

3. Skeĉo

laŭ la modelo de la 1a leciono + transformigu

4. Ekzercoj de la 6a leciono

5. Tasko por la venonta kurso

laŭ la modelo de la unua leciono

Gramatikaĵoj

Por ke ... -u : *Mi lernas, por ke mi sciu mian lecionon.*

Prepozicioj: por, sen (krom)

Sufiksoj: -id-, -aĵ-

Prefikso: ek-

Salutoj kun afablaĵoj

Refleksivo: si, sia

Teksto : Bona novaĵo

1. Ripetado de la 6a leciono

- Rakontigu la skeĉon.
- Kolektu la hejmajn taskojn.
- Dufoja aŭskultado de la 7a teksto.

2. Ekzercoj - Vortprovizo kaj strukturoj

Parola ekzerco A

Poste la gelernantoj mem faru frazojn:

Mi laboras, por ke ... -u.

Mi multe legas, por ke ... -u (*pluraj diru frazojn*)

Mi rapidas, por ke ... -u.

Kion oni bezonas por skribi? legi? manĝi? dormi?

Ĝis kiam vi lernas vespere? (relernigu la horojn)

Ido de hundo estas hund-id-o. Kio estas ido de kato? elefanto? koko? porko? bovo? lupoj?

Viando de koko estas kok-aĵ-o. Kio estas (aŭ kiel nomiĝas) viando de porko? de bovo? de bovido?

Io, kio, n oni trinkas, estas trinkaĵo. Kio estas io, kion oni manĝas? legas? skribas? aĉetas? sendas?
(*klarigu rapide: io, kio estas ...*)

Vi komencis lerni Esperanto antaŭ ... tagoj.

aŭ : Vi ek-lernis Esperanton antaŭ ... tagoj.

Kiam vi eklernis legi?

Je kioma horo vi ekdormas?

Kiam vi ekmanĝis hodiaŭ matene?

Kiam vi ekĝojas?

Kial la infano ekkrias?

Kiam la gelernantoj eksidas?

Instruisto : Ek-staru! Kion vi faras? Lernanto : Mi ek-staras.

Instruisto : Ek-sidu!

Lernanto : Mi ek-sidas. (*al pluraj gelernantoj*)

Ĉu mi estas via instruisto ?
Ĉu mi estas lia/ŝia instruisto ?
Ĉu vi nun parolas kun mi ?
Li/ŝi parolas kun sia instruisto.
Ĉu li/ŝi parolas kun sia instruisto.
Ĉu li/ŝi lernas per sia libro?
Ĉu li/ŝi venis sen sia libro?
Ĉu li/ŝi forgesis sian libron?

Ekzerco B

Poste ili konjugaciu:

- | | |
|------------------|-------------------------|
| 1. Mi banas min. | 2. Mi lavas mian aŭton. |
| Vi banas vin ... | Vi lavas vian aŭton. |

3. Skeĉo

laŭ la modelo de la 1a leciono + transformigu

4. Ekzercoj de la 7a leciono

5. Tasko por la venonta kurso

laŭ la modelo de la unua leciono

Gramatikaĵoj

Konjunkcioj : kvankam, nek ... nek, eĉ ne

Prepozicioj : pro, da (glaso da akvo)

Sufiksoj : -ig-, -em-

Teksto : La bebo

1. Ripetado de la 7a leciono

- Rakontigu la skeĉon.
- Kolektu la hejmajn taskojn.
- Dufoja aŭskultado de la 6a teksto.

2. Ekzercoj - Vortprovizo kaj strukturoj

Ĉu vi ŝatas lerni ? ... Ĉu ankaŭ vi ? ... kaj vi ? (*al pluraj*)

Vi estas lernemaj !

Kia estas iu, kiu ŝatas manĝi ? trinki ? skribi ? koleri ? pardoni ? danki ?
(postulu la tutan frazon)

Kio estas pens-em-ulo ? danc-em-ulo ? kant-em-ulo ? gekis-em-uloj ?

En la posta ekzerco la filo estas dankema.

Parola ekzerco C (danki pro)

La patro ne estas kontenta, kvankam la filo estas dankema !

La gelernantoj daŭrigu la jenajn frazojn pere de kvankam.

Li aĉetis novan aŭton, kvankam ...

Ili kuras sur la straton, ...

Li (ŝi) malfruas en la lernejo, ... (*petu plurajn respondojn*)

Geamikoj venas al la domo de la gepatroj.

La domo ne estas tre bela. Ili do bel-ig-as la domon.

Parola ekzerco B

Ili konstruu aliajn frazojn enhavantajn -ig- vortojn.

Nun la gepatroj kaj geamikoj diskutas.

Parola ekzerco A

(la strukturo nek ... nek ... ne estas tre ofta, sed ĝi ebligas refojan uzon de la akuzativo)

Ili trinkas ion. Kion ili povas trinki ? Ekzemple: glason da vino.

Kion ili ankaŭ povas trinki kaj manĝi ? (*la gelernantoj uzu "glaso", "taso", "telero"*)

Dum ili parolas, la hundo kuras post la kato, ili kuras ĉien en la ĉambro.

Kien? (*petu multajn ekzemplojn kun akuzativo de direkto aŭ al, tra, ĝis*)

Oka leciono

Instruisto :	Lernanto :
Ĉu la geamikoj salutis ?	Ne, ili eĉ ne salutis !
... manĝis ?	Ne, ili ...
... trinkis ?	...
... iom helpis ?	
... dankis ?	

La instruisto faru demandojn per "ĉu ..."

La gelernantoj respondu: "La instruisto volas scii, ĉu ..."

Rimarko: post la parola pritrakto de la ekzerco C, la gelernantoj uzu ĉiam vorton en frazo.

3. Skeĉo

laŭ la modelo de la 1a leciono + transformigu

4. Ekzercoj de la 8a leciono

5. Tasko por la venonta kurso

laŭ la modelo de la unua leciono

Gramatikaĵoj

Kondicionalo : -us (*Se mi estus sana, mi estus feliĉa.*)

Akuzativo de mezuro : 3 eŭrojn, 2 metrojn

Subjunkcioj : ju ... des ...

Sufiksoj : -ad-, -ar-

Teskto : Revoj pri feriado

1. Ripetado de la 8a leciono

- Rakontigu la skeĉon kaj transformigu ĝin.
- Kolektu la hejmajn taskojn.
- Dufoja aŭskultado de la 9a teksto.

2. Ekzercoj - Vortprovizo kaj strukturoj

Ekzemplo: Mi estas malriĉa... Mi ne povas aĉeti domon.
 Se mi est-us riĉa, mi pov-us aĉeti domon!
 (*Ripetu mem kaj ripetigu plurfoje*)

Parola ekzerco A

Poste la gelernantoj memfaru frazojn:

Kion vi farus, se vi havus aŭton?

... se vi estus instuist(in)o ? (*demandu al pluraj*)

... se vi havus grandan domon?

... se vi estus dekjara lernanto?

Tiuj-ĉi pomoj pezas 2 kilogramojn.

Tiu-ĉi ĉambro estas 3 metrojn longa. (*montru plurajn nombrojn kaj ripetigu*)

Tiu-ĉi libro kostas 4 eŭrojn.

Se mi aĉetas multon, mi pagas multon: Ju pli mi aĉetas, des pli mi pagas.

(*insisti pri la neceso kunligi la esprimon "ju pli" kaj "des pli"*)

Ekzemple: Ju pli simpatia ... des pli da amikoj oni hava !

 Ju pli da ferioj des pli ĝojaj ...

Parola ekzerco B

Kiam iu longe dormas, oni diras, ke li/ŝi dormadas.

Kion faras iu, kiu longe parolas ? Iu, kiu ... paroladas !

... .. demandas ? Iu, kiu ... demandadas!

... .. manĝas ? ...

... .. laboras ?

... .. rakontas ?

... .. promenas ?

Naŭa leciono

Kolekto de vagonoj estas vagon-aro.

Kio estas kolekto de arboj ? birdoj ? junuloj ? folioj?

manĝiloj? skribiloj? montoj? vortoj? homoj?

Kiam vi promenas tra la arbaro?

Kion oni aŭdas en la arbaro?

Kiu kolora estas la foliaro de la arboj?

Kion oni diras pri la hodiaŭa junularo?

Kien oni metas la manĝilaron?

Kiu bezonas skribilaron kaj vortaron?

3. Skeĉo

laŭ la modelo de la 1a leciono + transformigu

4. Ekzercoj de la 9a leciono

5. Tasko por la venonta kurso

laŭ la modelo de la unua leciono

Rimarko: Vi mem notu la plej oftajn erarojn kaj listigu ekzercojn refarotajn.

Gramatikaĵoj

Adverba finaĵo en la esprimoj: Estus bone, se... . Estas agrable ..., ktp

Sufiksoj: -iĝ-, -ebl-, -uj-, -er-

Teksto : Laboremo

1. Ripetado de la 9a leciono

- Rakontigu la skeĉon + transformigu ĝin.
- Kolektu la hejmajn taskojn.
- Dufoja aŭskultado de la 9a teksto.

2. Ekzercoj - Vortprovizo kaj strukturoj

Diru al la gelernantoj (*kaj faru samtempe!*)

Mi staras. Nun mi sidiĝas.

Mi sidas. Nun mi stariĝas.

Ordonu al ili: Stariĝu! Kion vi faras? Kion li/ŝi faris?

Sidiĝu! Kion vi faras? Kion li/ŝi faris?

Klarigi al ili: La patrino vekas Marian. Nun ŝi vekas.

Ŝi saltas el la lito. = Ŝi ellitiĝas.

Parola ekzerco A

Jam de longe vi ne plu vidias vian amikino Klara.

Kion oni diras pri ŝi?

Parola ekzerco B

Ĉu panon oni povas manĝi? Jes, ĝi estas manĝebla!

Ĉu lakton oni povas trinki? Jes, ĝi estas ...

Ĉu Esperanton oni povas paroli?

Ĉu tiun libron oni povas mendigi?

Ĉu tiun fridujon oni povas aĉeti?

Ĉu la krion de la infano oni povas aŭdi?

Ĉu la urbon oni povas rapide viziti?

Sur la tablo de Maria troviĝas etaj pecoj da pano.

Estas pan-er-oj.

Kiel nomiĝas etaj pecoj da glaciero?

Kion oni faras per moneroj?

Monerojn oni metas en mon-uj-on.

Kien oni metas paperojn? manĝaĵojn ?

En kio oni sin banas?

En kio oni lavas siajn vestaĵojn?

Deka leciono

Rimarko: Menciu (sen ekzercoj) la sufikson -on- kaj -ec-

Atentu: Tio estas agrabla.

Estas agrable kuŝi en la suno.

Kuŝi en la suno estas agrable.

Ekzerco C

La bildoj sen teksto ĉe la fino de la leciono ebligas refari multajn ekzercojn.

3. Skeĉo

laŭ la modelo de la 1a leciono + transformigu

4. Ekzercoj de la 10a leciono

5. Tasko por la venonta kurso

laŭ la modelo de la unua leciono

Konsilo al la gelernantoj : Ili relegu la tutan libron antaŭ ol daŭrigi la lernadon per alia libro.

Kroma leciono

Nun venas la momento, konsili al la lernantoj mem direkti sian plulernadon.

Per la aldonita teksto (t.e. letero), instigu ilin serĉi la nekonatajn vortojn en la vortaro. Ili al kutimiĝu al verkado de leteroj, de raportoj, de difinitaj rakontoj helpe de pli riĉa vorto-trezoro.

Verŝajne ili mem decidus parkerigi la lastan liston de vortoj. Bone konfirmu al ili, ke dank' al nia metodo, ili, tiam, scipovos la 500 plej uzatajn vortojn kaj tiel ne havos problemojn alparoli en konversacioj, renkontoj, kongresoj... iun ajn alian fremdan esperantiston!

... kaj ek al nuancoriĉa praktikado de la internacia lingvo per METODO 12

Se vi trovis eraron en tiu gvidlibro, aŭ se vi havas demandon aŭ rimarkon pri tiu gvidlibro, bonvolu skribi al metodo11@esperanto-france.org

© Espéranto-France, 2018
Tous droits réservés (utilisation et adaptation) pour tous pays.